

**25 Jahre Esperanto-Arbeitsgemeinschaft
in der Diözese Speyer**

**25 jarojn Esperanto-Laborunuiĝo
en la diocezo Speyer**

1991 – 2016



PONTO / SPEYER / 2016

Inhalt

Einführung	4
Aufgaben und Tätigkeitsbereiche	8
Orte	10
Werke	14
Personen	18
Ereignisse (Chronik)	27
Mitgliederstatistik	32
Unsere Verstorbenen	33
2011: Drei Jubiläen und ein Ende	35

Enhavo

Enkonduko	4
Taskoj kaj agadkampoj	8
Lokoj	10
Verkoj	14
Personoj	18
Eventoj (Kroniko)	27
Membrostatistiko	32
Niaj mortintoj	33
2011: Tri jubileo kaj unu fino	35

Impressum:

Franz-Georg Rössler (Hsg.)

25 Jahre Esperanto-Arbeitsgemeinschaft in der Diözese Speyer

25 jarojn Esperanto-Laboruniĝo en la diocezo Speyer

1991 – 2016

PONTO / SPEYER / 2016 • ISBN 3-9803793-6-1

Druck: publish print R&R GmbH, 67373 Dudenhofen / Auflage: 500

**25 Jahre „Arbeitsgemeinschaft der Internationalen
Katholischen Esperanto-Vereinigung (IKUE)
in der Diözese Speyer“**

**25 jarojn „Laborunuiĝo de la Internacia
Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)
en la diocezo Speyer“**

1991 – 2016



La estraro en la jaro 2016:
Albrecht Kronenberger, Anton Kiefer, Rita Rössler-Buckel

Festschrift in Deutsch und in Esperanto

Festbroŝuro en la germana kaj en Esperanto

Dankwort des Präses

Rückblick auf 25 Jahre Esperanto-Arbeitsgemeinschaft in der Diözese Speyer, auf Orte, Werke, Personen, Ereignisse: So viele Begegnungen wurden uns geschenkt. So vieles konnten wir erreichen. So viele Menschen wirkten zusammen, gaben einander moralische Unterstützung.

All das ist für mich ein Zeichen der überreichen Gnade Gottes.

Danke!

Die Esperanto-Arbeitsgemeinschaft als Organisation geht nun zu Ende. Nicht zu Ende gehen die Gemeinschaft, die Arbeit und die Hoffnung.

Danko de la spirita prezidanto

Retrorigardo pri 25 jaroj de la Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer, pri lokoj, verkoj, personoj, eventoj: Tiom da renkontiĝoj estis donacataj al ni. Tiom ni povis atingi. Tiom da homoj kunagis, donis moralan subtenon unuj al aliaj.

Ĉio tio por mi estas signo de la abunda beno de Dio.

Dankon!

La Esperanto-Laborunuiĝo kiel organizaĵo nun ĉesas, sed ne ĉesos la unueco, nek la laboro, nek la espero.

Albrecht Kronenberger

Vorwort der Vorsitzenden

Vor fünf Jahren haben wir in der Afra-Kapelle des Domes in Speyer und im benachbarten Friedrich-Spee-Haus das 20-jährige Bestehen unserer Arbeitsgemeinschaft gefeiert. In diesem Jahr wollen wir mit Gottesdienst und Feierstunde im Kardinal-Wendel-Haus in Homburg auf 25 Jahre Gemeinsamkeit und Arbeit zurückblicken.

Unsere Arbeitsgemeinschaft hat über ein Vierteljahrhundert hinweg den christlichen Glauben in der internationalen Sprache Esperanto bezeugt. Mit ihrer Anbindung an die Diözese Speyer konnte sie in vielen Veranstaltungen weit über deren Grenzen hinaus die Bedeutung des Marien- und Kaiserdoms, der Diözese und der Stadt vermitteln.

Mit diesem unserem Jubiläum schließen wir gleichzeitig die offizielle Arbeit und die vereinsrechtliche Organisation unserer Vereinigung ab. Die Gründergeneration ist älter geworden, nicht wenige sind bereits verstorben. Die Jüngeren haben andere Wege gefunden, die christliche Botschaft in Esperanto auf ihre Weise weiterzutragen. In Publikationen, Konferenzen, Kongressen, aber auch mit Hilfe der aktuellen technischen Entwicklung sind sie präsent, wenn auch nicht mehr formell strukturiert und organisiert, wie wir es waren.

So halten wir mit dieser Schrift dankbar und gerne unseren Beitrag zur großen Esperanto-Bewegung mit ihren christlichen Elementen fest, der mit Dom und Diözese Speyer an einem Grundpfeiler des christlichen Abendlandes verankert war.

Antaŭparolo de la prezidantino

Antaŭ kvin jaroj ni festis en la Afra-kapelo de la katedralo en Speyer kaj en la najbara Friedrich-Spee-domo la 20-jaran ekzistadon de la Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer. En la aktuala jaro ni per Diservo kaj solenaĵo en la Kardinal-Wendel-domo en Homburg volas retrorigardi al 25 jaroj da komuna laboro.

Nia laborunuiĝo dum kvarona jarcento atestis la kristanan kredon en la internacia lingvo Esperanto. Pro la ligo al la diocezo Speyer ni povis per dum multaj aranĝoj trans la naciaj limoj la signifon de nia mondfama katedralo, de la diocezo kaj de la urbo.

Samtempe kun nia tiuĉijara jubileo ni ĉesigas la oficialan laboron kiel laŭleĝa asocio. La fondogeneracio maljuniĝis; multaj jam mortis. La pli junaj trovis vojojn laŭ novaj manieroj por plutransporti la kristanan mesaĝon. Ili ne plu organizas sin formale, striktastruktore kiel ni, sed prezentas sin ekzemple en publikigaĵoj, konferencoj, kongresoj, nun precipe pere de la aktuala teknika evoluado.

Ni per tiu ĉi kajero dankeme kaj volonte memoras kaj memorigas nian kontribuon al la granda Esperanto-movado kun ĝiaj kristanaj elementoj. Tiu nia laboro ankris firme ĉe la katedralo kaj la diocezo Speyer, unu el la bazaj pilastroj de la kristana Okcidento.

Rita Rössler-Buckel

Vor der Gründung der Esperanto-AG Speyer

1. Esperanto am Nikolaus-von-Weis-Gymnasium, 1. Periode

Helmut Rössler unterrichtet ab 1966 Schwestern des Instituts St. Dominikus in Speyer (damals „Arme Schulschwestern“), darunter die Oberin Dr. Petronia Steiner, in Esperanto.

Aus Anlass der dort stattfindenden Tagung der Südwestdeutschen Esperanto-Liga wird in der Klosterkirche am 9. 4. 1967 eine erste Messe in Esperanto gefeiert (Zelebrent: Dekan Jakob Bergweiler), später eine zweite Esperanto-Messe unter Beteiligung der Schule.



Institut St. Dominikus in Speyer, Kloster der Armen Schulschwestern

2. 1985 Augsburg (70a Universala Kongreso)

Gottesdienst in Esperanto, erste Begegnung Helmut & Ida Rössler mit Rita & Franz-Georg Rössler („samnomuloj el la sama urbo Speyer“).

3. Bibelwochenenden in Bad Wimpfen

Ab 1986 mehrmals im Kloster St. Peter im Tal, mit Speyerer Beteiligung, ökumenisch, mit Pfarrer Bernhard Eichkorn und Pfarrer Adolf Burkhardt. Referent: P. Willibald Kuhnigk OSB.

4. Esperanto am Nikolaus-von-Weis-Gymnasium, 2. Periode

Franz-Georg Rössler unterrichtet ab 1986 in Arbeitsgemeinschaften und in Projektwochen die internationale Sprache Esperanto. Kontakte zu ausländischen Esperanto-Institutionen (z. B. zum Rheinland-Pfälzischen

Partnerland Ruanda, zum Esperanto-Museum Samarkand, zur chinesischen Zeitschrift „El Popola Ĉinio“ werden aufgenommen, die Nachricht über „Speyer 200 Jahre“ wird in alle Welt verbreitet (120 Rückmeldungen aus 40 Ländern).

Sammlungen für kirchliche Sozialprojekte, z. B. für Agado E3 (Blindenhilfe, Jacques Tuinder) oder Leprosenhilfe (Dr. József Kondor).

In Schulgottesdiensten werden auch Lieder in Esperanto gesungen.

Neben einer intensiven Pressearbeit entstehen die Schriften

- *Esperanto am Nikolaus-von-Weis-Gymnasium* (Speyer 1980) (darin viele Informationen und Details zur Vorlaufphase) und
- *Dominikus – Leben und Werk / Pri Sankta Dominiko* (Speyer 1989) (darin das „Dominikuslied“ von Dr. Petronia Steiner in der Esperanto-Übersetzung von Rikardo Ŝulco).

5. Kontakt der Speyerer Esperantisten mit Oberstudienrat im Kirchendienst Albrecht Kronenberger (Neustadt an der Weinstraße), erstmals wohl in Homburg, Kardinal-Wendel-Haus (Kulturaj Semajnfinoj der SEL).

Albrecht Kronenberger erlernte ab 1987 im Selbststudium die internationale Sprache Esperanto. Erste Gottesdienste in Homburg.



Bibelwochenende in Bad Wimpfen 1987:
Günther Becker, Theotima Rotthaus, Bernhard Eichkorn, ↓ Philippe Cousson, Adolf Burkhardt,
Rita Rössler-Buckel, Franz-Georg Rössler, Edith Biberstein,
jeweils mit ihren Publikationen in Esperanto

Aufgaben der Esperanto-Arbeitsgemeinschaft

Beteiligung am kirchlichen Leben innerhalb und außerhalb der Diözese, insbesondere durch die Verwendung der internationalen Sprache Esperanto, um so Esperanto in die Kirche zu tragen, aber auch christliche Werte in „Esperantujo“ präsent zu machen.

Unsere Satzung nennt unter anderem ausdrücklich:

- Förderung der weltweiten Einheit der Kirche.
- Förderung von Frieden und Völkerverständigung in der Welt.

Tätigkeitsbereiche der Esperanto-Arbeitsgemeinschaft

1. Regelmäßige Gottesdienste in Esperanto am Dom zu Speyer.
2. Gestaltung oder Mitgestaltung von Esperanto-Gottesdiensten, u. a. bei:
 - Kulturwochenenden der Saarländischen Esperanto-Liga in Homburg,
 - Treffen der Esperantogruppen Stuttgart und Aalen,
 - Veranstaltungen der Landesverbände Baden-Württemberg und Rheinland-Pfalz,
 - Deutschen Esperanto-Kongressen und Esperanto-Weltkongressen
 - Weltkongressen von IKUE und KELI (konfessionell oder ökumenisch),
 - Katholikentagen, Evangelischen und Ökumenischen Kirchentagen,
 - Treffen wie IF (Internacia Festivalo) oder NR (Novjara Renkontiĝo)
3. Informationsstände bei Kirchentagen und ähnlichen Veranstaltungen.
4. Ausrichtung von Veranstaltungen in katholischen Bildungshäusern:
 - MES auf der Marienburg bei Zell/Mosel zusammen mit dem DEB-Landesverband Rheinland-Pfalz,
 - PSI auf Maria Rosenberg (Waldfishbach-Burgalben) und im Haus Venusberg (Bonn) zusammen mit dem Deutschen Esperanto-Bund.
5. Beteiligung an Bibeltagen, ADORU-Seminaren u. a.
6. Vorträge, Ausstellungen, Musikveranstaltungen zu Themen der Diözese, der Region und zu Esperanto.
7. Erstellung des ökumenischen Gottesdienstbuches ADORU (Ponto 2001, ISBN 3-9803793-5-3).
8. Neuauflage BIBLIO (Kava-Pech 2006, ISBN 80-85853-90-6).
9. Schaffung des Internetportals KRISTANAJ FONTOJ (fontoj.net).

Taskoj de la Esperanto-Laborunuiĝo

Partopreno en la eklezia vivo en kaj ekster la diocezo Speyer, ĉefe uzante la internacian lingvon Esperanto, por tiamaniere porti Esperanton en la eklezion, sed ankaŭ por prezenti kristanajn valorojn en Esperantujo.

Niaj statutoj mencias inter aliaj:

- Antaŭenigo de la mondvasta unueco de la eklezio.
- Antaŭenigo de paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo.

Agadkampoj de la Esperanto-Laborunuiĝo

1. Regulaj Diservoj en Esperanto en la katedralo de Speyer.
2. Okazigo de Esperanto-Diservoj aŭ kunagado en ili, i. a. ĉe:
 - kulturemajnfinoj de la Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) en Homburg,
 - renkontiĝoj de la Esperanto-Grupoj Stuttgart kaj Aalen,
 - staĝoj de la landaj ligoj de Baden-Virtembergo kaj Rejnland-Palatinato,
 - Germanaj Esperanto-Kongresoj (GEK) kaj Universalaj Kongresoj (UK)
 - tutmondaj kongresoj de IKUE kaj KELI (ĉu konfesiaj ĉu ekumenaj),
 - ekleziaj foiroj, ĉu katolikaj ĉu evangeliaj ĉu ekumenaj,
 - kunvenoj kiel Internacia Festivalo (IF) kaj Novjara Renkontiĝo (NR)
3. Informstandoj dum ekleziaj foiroj aŭ similaj aranĝoj.
4. Okazigo de kunvenoj en katolikaj klerigaj domoj:
 - MES sur Marienburg apud Zell/Mosel kune kun la GEA-Landoligo Rejnland-Palatinato,
 - PSI en Maria Rosenberg (Waldfishbach-Burgalben) kaj en la Domo Venusberg (Bonn) kune kun la Germana Esperanto-Asocio (GEA).
5. Kunagado ĉe Bibliaj Tagoj, ADORU-Seminarioj k. a.
6. Prelegoj, ekspozicioj, muzikaj eventoj pri temoj de la diocezo aŭ regiono kaj pri Esperanto.
7. Verkado de la Ekumena Diserva Libro ADORU (Ponto 2001, ISBN 3-9803793-5-3).
8. Noveldono de la BIBLIO (Kava-Pech 2006, ISBN 80-85853-90-6).
9. Estigo de la interreta portalo KRISTANAJ FONTOJ (fontoj.net).

Afra-Kapelle



Zentrale Veranstaltungen der Arbeitsgemeinschaft waren ab 1991 die regelmäßigen Messen in der Afra-Kapelle des Doms, die auch im Bistumsblatt „der pilger“ und im Speyerer Kirchenblatt angekündigt wurden. Zelebrant war meist Oberstudienrat im Kirchendienst Albrecht Kronen-

berger, gelegentlich vertreten von oder zusammen mit anderen Geistlichen der Gemeinschaft (Bernhard Eichkorn, Karl Cunz, Manfred Odenwald, P. Peter Knauer SJ, Otto Lehner, auch Diakon Michael Hockertz). Oft hielt auch der jeweilige Vorsitzende eine kurze Ansprache.

Zur Musik trugen fast immer Rita und Franz-Georg Rössler (Flöte / Orgel) bei. Im letzten Gottesdienst 2011 spielten das Blockflötenensemble der Musikschule Rhein-Pfalz-Kreis und das Ensemble Spirale aus Speyer.

Wir durften zu jeder Messe zwei Hinweistafeln aufstellen – nebenbei eine gute Werbung für Esperanto im Weltkulturerbe Speyerer Dom.

Centra aranĝo de la laborunuiĝo estis ekde la jaro 1991 la regulaj mesoj en la Afra-kapelo de la katedralo, kiuj estis anoncitaj en la dioceza gazeto „der pilger“ kaj en la Eklezia Informilo de Speyer. Plej ofte celebris pastro Albrecht Kronenberger, foje akompanis aŭ anstataŭis lin aliaj pastroj el la asocio (Bernhard Eichkorn, Karl Cunz, Manfred Odenwald, P. Peter Knauer SJ, Otto Lehner, ankaŭ diakono Michael Hockertz). Ofte la prezidantoj alparolis mallonge la komunumon.

Rita kaj Franz-Georg Rössler (fluto / orgeno) muzikis preskaŭ ĉiam. En la lasta Diservo 2011 ludis la Bekfluta Ensemblo de la Distrikto Rejno-Palatinato kaj la „Ensemble Spirale“ el Speyer.

Ĉiun fojon ni rajtis starigi du indikotabulojn – cetere ankaŭ bona varbado por Esperanto en la monda kulturheredaĵo katedralo de Speyer.

Magdalenenkloster



In den ersten Jahren gingen wir meist nach dem Gottesdienst in ein Café oder eine Eisdiele in der Stadt. 2003 entdeckten wir die Gastfreundlichkeit des Magdalenenklosters bei Kaffee und Kuchen.

Auch drei unserer Mitgliederversammlungen fanden dort statt.

En la unuaj jaroj ni post la Diservo kutime iris en iun kafejon aŭ glaciaĵejon en la urbo. En 2003 ni malkovris la gastamon de la monaĥinejo Sankta Magdalena ĉe kafo kaj kuko. Ankaŭ tri niaj membrokunvenoj okazis tie ĉi.

Johanniskreuz



Anton Kiefer, Albrecht Kronenberger und andere informierten auf mehreren Diözesan-Katholikentagen in Johanniskreuz, mitten im Pfälzer Wald, (auch in Speyer, Homburg und Kusel) über Esperanto, IKUE und die Arbeitsgemeinschaft.

Anton Kiefer, Albrecht Kronenberger kaj aliaj informis dum pluraj diocezaj katolikaj foiroj en Johanniskreuz, meze en la Palatinata Arbaro, (ankaŭ en Speyer, Homburg / Sarlando kaj Kusel) pri Esperanto, IKUE kaj la laborunuiĝo.

Ĉe la informstando:
nia tiama episkopo d-ro Anton Schlembach

Maria Rosenberg



Im Wallfahrtsort Maria Rosenberg bei Waldfishbach-Burgalben im Pfälzer Wald feierte die Arbeitsgemeinschaft die Osternachtliturgie und andere Gottesdienste bei regionalen wie überregionalen Esperanto-Veranstaltungen, u. a. fünfmal Internationale Frühlingswoche (PSI).

En la pilgrima loko Maria Rosenberg apud Waldfishbach-Burgalben en la Palatinata Arbaro la laborunuiĝo celebris la liturgion de la Paska Nokto kaj aliajn Diservojn dum regionaj kaj transregionaj Esperanto-aranĝoj, i. a. kvin fojojn Printempa Semajno Internacia (PSI).

Haus Venusberg



Die Arbeitsgemeinschaft war viermal organisatorisch an der Internationalen Frühlingswoche in Bonn, Haus Venusberg, beteiligt. Nach Möglichkeit feierten wir dabei die Gründonnerstags-, Karfreitags- und Osternachtliturgie.

Kvarfoje la laborunuiĝo kunorganizis la Printempan Semajnon Internacian (PSI) en Bonn, Haus Venusberg. Laŭeble ni tiuokaze celebris la liturgiojn de la Sanktaj Ĵaŭdo kaj Vendredo kaj de la Paska Nokto.

Marienburg



Auf der Marienburg bei Zell an der Mosel organisierten wir fünfmal in Zusammenarbeit mit dem DEB-Landesverband Rheinland-Pfalz die Esperanto-Wochenenden der Moselregion (MES).

En Marienburg apud Zell/Mosel ni organizis

kvin Mozellandajn Esperanto-Semajnfinojn (MES) kune kun la GEA-Landoligo Rejnland-Palatinato.

Kloster Kirchberg

In Kloster Kirchberg, bei Sulz am Neckar, traf sich zwischen 1995 und 2001 immer wieder das Redaktions- und Autorenteam für ADORU. Es gab sich auch den Namen Kloster Kirchberg. Zehn Jahre nach dem Tod von Adolf Burkhardt fand 2014 ein Gedenktreffen statt.

Tie ĉi kunvenadis inter 1995 kaj 2001 la redakcia kaj aŭtora teamo por ADORU, kiu sin nomis same: Kloster Kirchberg. Dek jarojn post la morto de Adolf Burkhardt okazis en 2014 renkontiĝo memore al li.



Ernst Leuze, Anton Kiefer, Alois Eder, Grete Burkhardt, Bernhard Eichkorn, Hedwig Schaeffer, Siegfried Krüger, Albrecht Kronenberger, Karl-Heinz Schaeffer

ADORU



Für die Gottesdienste in der Afra-Kapelle und für andere christliche Begegnungen auf Esperanto-Konferenzen und -Kongressen zeigte sich – nach Jahren aufwändigen Erstellens von Liedblättern – immer dringender der Bedarf nach einem umfassenden Gesang- und Gebetbuch in Esperanto.

So schufen der lutherische Pfarrer Adolf Burkhardt

(schon 1971 Mitautor von „Adoru Kantante“, 1974 – 1990 Autor von „Tero kaj Ĉielo Kantu“), der katholische Pfarrer Bernhard Eichkorn und Oberstudienrat Albrecht Kronenberger das offizielle Esperanto-Gesangbuch von IKUE und KELI.

Das 2001 erschienene ökumenische Gottesdienstbuch ADORU ist mit seinen 1472 Seiten auf Dünndruckpapier umfangreicher als das aktuelle „Gotteslob“. Es enthält neben Gebeten und Gottesdienstmodellen verschiedener Konfessionen etwa 900 Lieder und Gesänge aus vielen christlichen Traditionen in aller Welt.

Für die kompilatorische, redaktionelle und editorische Arbeit wurde den drei Autoren im Jahr 2002 der renommierte FAME-Preis in der Stadt- und Esperantobibliothek Aalen verliehen.

Evidentiĝis, ke por la Diservoj en la Afra-kapelo kaj por aliaj kristanaj renkontiĝoj okaze de konferencoj kaj kongresoj – post la pena, laborriĉa produktado de kantofolioj – pli kaj pli kreskis la bezono je iu ampleksa kanto- kaj preĝolibro.

Tial la luterana pastoro Adolf Burkhardt (jam 1971 kunaŭtoro de „Adoru Kantante“, 1974 – 1990 aŭtoro de „Tero kaj Ĉielo Kantu“), la katolika paroĥestro Bernhard Eichkorn kaj pastro Albrecht Kronenberger verkis la oficialan himnaron de IKUE kaj KELI.

La en 2001 aperinta Ekumena Diserva Libro ADORU estas kun 1472 paĝoj sur fajna biblia papero pli ampleksa ol la germana „Gotteslob“. Ĝi entenas, krom preĝoj kaj Diservaj modeloj el diversaj konfesioj, ĉ. 900 himnojn kaj kantojn el multaj kristanaj tradicioj de la tuta mondo.

Por tiu ĉi kompila, redakta kaj editora laboro la tri aŭtoroj en 2002 ricevis la renomnan FAME-premion en la urba kaj esperanta biblioteko de Aalen.



La FAME-premiitoj Bernhard Eichkorn, Adolf Burkhardt kaj Albrecht Kronenberger (kun Ernst Leuze, kiu kontrolis kaj verkis la akordojn).

Ili portas la tri eldonojn: la nigran lukse en ledo binditan kun ora tranĉrando, la bluan kun 128-paĝa apendico por la polaj esperantistoj, kaj la normalan ruĝan.

Pianosätze

Kirchenmusikdirektor Ernst Leuze komponierte zu fast allen Liedern Pianosätze unterschiedlicher Schwierigkeitsgrade, meist mit Vor- und Nachspiel. Es handelt sich nicht um umgebaute Orgelsätze, sondern um originäre Kompositionen für Klavier. Man findet sie im Internetportal KRISTANAJ FONTOJ. ► fontoj.net > Adoru oder ► fontoj.net > muziki

La ŝvaba eklezia muzikdirektoro Ernst Leuze komponis por preskaŭ ĉiuj kantoj pianoaranĝojn en diversaj gradoj de malfacileco, pleje kun preludo kaj postludo. Temas ne pri adaptitaj orgenaranĝoj, sed pri originaj komponaĵoj por pianoforto. ► fontoj.net > Adoru aŭ ► fontoj.net > muziki

Bibel



Bernhard Eichkorn (Organisation), Albrecht Kronenberger (Computer) und Petr Chrdle (Tschechien, Verlag KAVA-PECH) besorgten für IKUE und KELI die Neuauflage der Bibel 2006, mit den deuterokanonischen Büchern in der Übersetzung von Gerrit Berveling (Niederlande) und in der Reihenfolge der Vulgata. Andere Mitglieder halfen beim Korrekturlesen und bei der Entscheidung über die formale Gestaltung.

Mitglieder sind auch die letztverantwortlichen Miloslav Šváček (Tschechien, damals IKUE-Vorsitzender) und Philippe Cousson (Frankreich, Vorsitzender von KELI), wie es auch dessen Vorgänger Jacques Tuinder (Niederlande) war.

Bernhard Eichkorn (organizado), Albrecht Kronenberger (komputilo) kaj Petr Chrdle (Ĉeĥujo, eldonejo KAVA-PECH) prizorgis por IKUE kaj KELI la noveldonon de la BIBLIO 2006, kun la duakanonaj libroj tradukitaj de Gerrit Berveling (Nederlando) kaj envicigitaj laŭ la Vulgato. Aliaj membroj helpis provlegi kaj decidi pri la formo.

Membroj estas ankaŭ la laste respondecaj Miloslav Šváček (Ĉeĥujo, prezidanto de IKUE) kaj Philippe Cousson (Francujo, prezidanto de KELI), same kiel estis ankaŭ ties antaŭulo Jacques Tuinder (Nederlando).



Chrdle



Berveling



Šváček



Cousson



Tuinder † 2011

KRISTANAJ FONTOJ



Das Internetportal wurde am 1. Adventssonntag 2010 von Bernhard Eichkorn, Albrecht Kronenberger und Albert Urban (Webmaster) eröffnet. Es bietet – ständig erweitert – reiches Material zu ADORU und zum Brevier, Pianosätze von Ernst Leuze, neue Lieder ... Die „Spiritaj Impulsoj“ enthalten u. a. für jeden Tag die Herrnhuter Losungen. ► fontoj.net

La interreta portalo KRISTANAJ FONTOJ estis inaŭgurata la unuan dimanĉon de Advento 2010 de Bernhard Eichkorn, Albrecht Kronenberger kaj Albert Urban (retejestro). Ĝi prezentas – daŭre pliampleksigota – riĉan materialon pri ADORU kaj la breviero, pianoarangĝojn de Ernst Leuze, novajn kantojn ... La „Spiritaj Impulsoj“ enhavas i. a. la Ĉi-tagan Vorton laŭ la Frataro de Herrnhut. ► fontoj.net

Messbuch



Die Arbeitsgemeinschaft übergab 1996 dem damaligen Domkustos Hubert Sedlmair das von Rom approbierte Messbuch mit Lektionar in Esperanto für den Gebrauch am Dom. Gestaltet wurde es von unserem Mitglied P. Hatto von Hatzfeld SDB.

La laborunuiĝo transdonis al la tiama katedrala kustodo Hubert Sedlmair la meslibron kun la legajaro en Esperanto, aprobitan de la vaticanaj instancoj, kompilitan de nia membro P. Hatto von Hatzfeld SDB.

Albrecht Kronenberger



Über seine Biographie und Lebensleistung, die weit über die Internationale Sprache hinausgehen, informieren ausführlich digitale Medien.

Für die Esperanto-Arbeitsgemeinschaft in der Diözese Speyer wurde er – erst spät mit dem Esperanto vertraut geworden – zum Initiator und wesentlichen Beweger. Als ihr Präses steht er für die Gründung und den Erhalt der Arbeitsgemeinschaft über 25 Jahre. Er war es, der sie organisatorisch und geistlich zusammenhielt.

Seine Bemühungen verschafften ihr die offizielle Bestätigung durch die Diözese, die staatliche Anerkennung als gemeinnützige Organisation, und die Möglichkeit, die Gottesdienste am Dom in Speyer zu halten.

Zur katholischen Dachorganisation IKUE hielt er die Verbindung, ebenso wie zu Esperanto-Repräsentanten anderer christlicher Kirchen. In entscheidungsvollen Jahren gehörte er zur Ökumenischen Kommission von IKUE und KELI; in beiden ist er Mitglied.

Pri lia biografio kaj pri la rezultoj de lia vivo, kiuj koncernas ne nur Esperanton, detale informas interretaj artikoloj.

Por la Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer li – nur malfrue esperantiĝinta – fariĝis iniciatinto kaj esenca motoro. Li, kiel spirita prezidanto, staras por la fondiĝo kaj 25-jara konserviĝo de la laborunuiĝo. Li estas tiu, kiu kuntenis ĝin organize kaj spirite.

Per liaj klopodoj ĝi estas oficiale konfirmita fare de la diocezo, agnoskita fare de la ŝtato kiel komunutila organizaĵo, kaj rajtigita celebri la Diservojn en la katedralo de Speyer.

Li flegis kontaktojn kun la katolika tegmenta organizo IKUE same kiel kun Esperanto-reprezentantoj el aliaj kristanaj eklezioj. Dum decidoplenaj jaroj li apartenis al la Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI; en ambaŭ li estas membro.

Das Gesangbuch ADORU verdankt ihm nicht nur die physische Existenz (Gestaltung und Satz), sondern auch viele Übersetzungen und einige Melodien. Die freien Predigten in Esperanto wollten vorbereitet sein, wie über viele Jahre hinweg auch die Liedblätter für die Gottesdienste.

Nach einem Schlaganfall 2009 musste er zunächst all seine Arbeit aufgeben, stellte sich aber später, sobald es ging, gerne wieder als Liturg und Referent zur Verfügung und schuf neue Lieder. Zuletzt leitete er den Gottesdienst im Rahmen des 93. Deutschen Esperantokongresses in München zu Pfingsten 2016. Es ist zu wünschen, dass seine kreativen Kräfte der christlichen Esperanto-Bewegung noch lange erhalten bleiben.

La himnaro ADORU ŝuldas al li ne nur sian fizikan ekzistadon (enkomputiligon), sed ankaŭ multajn tradukojn kaj kelkajn melodiojn. La senmanuskriptaj predikoj estis preparandaj, same kiel dum multaj jaroj ankaŭ la kantofolioj por la Diservoj.

Post apopleksio en 2009 li unue devis rezigni pri sia laboro, sed poste, ki- am eblis, li denove estis preta Diservi kaj referi kaj verkis novajn kantojn. Laste li gvidis la Diservon kadre de la 93a GEA-Kongreso en München. Estas dezirinde, ke liaj kreaĵ fortoj restu ankoraŭ longe je dispono por la kristana Esperanto-Movado.



70-jariĝo de la spirita prezidanto, Neustadt-Hardt 2010, ĉirkaŭ kvar monatojn post lia apopleksio: Manfred Ritthaler († 2012) • Rita Ritthaler • malantaŭ ili kaŝita: Ute Höchel, la domprizorgantino de la jubileulo • Rita Rössler-Buckel • Ida Rössler († 2016) • Helmut Rössler († 2012) • Anton Kiefer • profesoro Horst Kaufmann • Albrecht Kronenberger

Helmut Rössler



Helmut Rössler war erster Präsident der Arbeitsgemeinschaft (1992 – 1998).

Vielseitig gebildet und interessiert, hatte er ein waches Auge auf die Entwicklung seiner Kirche. Viele seiner Leserbriefe wurden im Bistumsblatt „der pilger“ veröffentlicht.

Zuverlässig nahm er mit seiner Frau Ida an den Esperanto-Gottesdiensten teil, die er durch seine kraftvolle Stimme gesanglich wie beim Vortrag der Lesung markant bereicherte.

Der in Sankt Martin aufgewachsene Mathematiker und Philologe war ein Pionier des Esperanto in Speyer und im deutschen Südwesten.

Der nachfolgende Nekrolog erschien in der katholischen Esperanto-Zeitschrift „Espero Katolika“ und im evangelischen „Dia Regno“.

Helmut Rössler estis la unua prezidanto de la Esperanto-Laborunuiĝo (1992 – 1998). Multflanke erudita kaj vaste interesiĝanta, li per viglaj okuloj observis la evoluon de la eklezio. Multaj liaj legantoleteroj estis publikigataj en la dioceza gazeto „der pilger“.

Fidele li partoprenis kune kun sia edzino Ida en niaj esperantaj Diservoj, kiujn li rimarkinde pliriĉigis per sia fortoplena voĉo, kantante kaj legante la legaĵon.

La en Sankt Martin elkreskinta matematikisto kaj filologo estis pioniro de Esperanto en Speyer kaj en sudokcidenta Germanujo.

La sekva nekrologo aperis en „Espero Katolika“ de IKUE kaj en „Dia Regno“ de KELI.

Mortis Helmut Rössler, engaĝiginta kristano kaj Esperantisto.

Impona voĉo eksilentas.

La 20an de februaro 2012 mortis en Speyer Helmut Rössler, matematikisto, Esperantisto kaj atentema katoliko. Li naskiĝis en 1925 kaj poste elkreskis en la palatinata Sankt Martin, kie la gepatroj posedis vinbieron. Postmilite li deĵoris kiel matematikisto en lernejoj kaj la lerneja administrado. En tiu tereno li akiris grandan renomon. Lia kombinema spirito aparte ŝatis la ŝakoludadon. Tiubaze li ankaŭ traktis matematikajn problemojn kaj kreis multajn popularajn kalkulajn kaj lingvajn enigmojn. En malfruaj jaroj li en sia lasta loĝurbo gvidis senioran grupon „Gaja matematiko“, en kies kadron li ludeme enkondukis Esperanton.

Aktiva kristano, li engaĝiĝis en diversaj paroĥoj kaj grupoj, aparte kiel membro de preĝejaj korusoj kaj laborante en diversaj funkcioj. Li konatiĝis en la diocezo Speyer pro sia kritikema observado de la interna disvolviĝo de lia eklezio, kiun li per tiutemaj legantoleteroj en la dioceza gazeto „der pilger“ (la pilgrimanto) akompanis, admonante kaj ŝanĝiĝojn instigante. Aparte li traktis la temojn sacerdoteco de virinoj, la rilato al divorcitoj kaj la ekumeno.

Esperantisto li fariĝis en 1955. Li komprenis la internacian lingvon ekumeno de lingvoj kaj kulturoj. Tuj li gvidis kursojn, prelegis, estis fakdelegito de UEA por matematiko kaj ties dumviva membro. Multon li verkis. Postrestas papere la tradukaj kontribuoj al ADORU kaj, apud multaj dise aperintaj mallongaj tekstoj, la kuntradukita impona „Germana antologio“. Inter 1992 kaj 1998 li estris la Laborunuiĝon de la Katolika Esperanto-Asocio (IKUE) en la diocezo Speyer, kun granda malfermiteco al aliaj kristanaj eklezioj. Dum 20 jaroj da regulaj esperantlingvaj Diservoj en la katedralo de Speyer, li tie multe kontribuis kiel kantoro kaj lektoro. Ankoraŭ en la lastaj kunvenoj li sentis la bezonon, publike kantante kaj legante kontribui al la mesoj. Kun lia morto eksilentas voĉo kvazaŭ signala en la eklezio, la socio, la ekumeno.

Franz-Georg Rössler

Manfred Ritthaler

Manfred Ritthaler war von der Gründung der Esperanto-AG an 20 Jahre lang im Vorstand: 1992 – 1998 und 2003 – 2011 als zweiter Vorsitzender, dazwischen 1998 – 2003 als erster Vorsitzender. Sein Name ist mit Esperanto und Neustadt unlösbar verbunden: Esperanto-Gruppe „Prospero“, Deutscher Esperanto-Kongress 1955, Volkshochschulkurse.

Er starb 79-jährig am 29. November 2012. Beim Nachruf zitierte Albrecht Kronenberger eine Inschrift: „Nicht nur Lehrer war er mit Begeisterung“.

Manfred Ritthaler estis dekomence estrarano de la Esperanto-Laborunuiĝo, dum 20 jaroj: de 1992 ĝis 1998 kaj de 2003 kiel dua prezidanto, de 1998 ĝis 2003 kiel unua prezidanto. Lia nomo estas nedisigeble ligita kun Esperanto kaj Neustadt: Esperanto-Grupo „Prospero“, GEA-Kongreso 1955, kursoj en la popolaltlernejo.

Li mortis 79-jaraĝa la 29an de novembro 2012. En la nekrologo Albrecht Kronenberger citis epigrafon: „Ne nur instruisto li estis kun fervoro“.



Manfred Ritthaler kaj lia edzino Rita dum postdiserva kunveno en la monaĥinejo S-ta Magdalena

Anton Kiefer



Anton Kiefer, Önologe und Weinbauer in Edenkoben, war von 2003 bis 2011 erster Vorsitzender, zuvor von 1998 bis 2003 und wieder ab 2011 war er zweiter Vorsitzender. Er war im Hintergrund mäzenatisch tätig, lieferte auch den Messwein für Gottesdienste. Bekannt sind seine Vorträge zum

Weinbau, seine Weinproben und die Flurführungen in Esperanto. Außerdem produzierte er hochgeschätzten „Esperanto-Wein“.

Gleich nach Übernahme des Vorsitzes organisierte er unsere Präsenz auf den Diözesankatholikentagen. Dazu kaufte er eigens ein Zelt, und später, als es vom Sturm zerstört war, gleich ein neues für die nächsten Jahre.



Anton Kiefer, enologo kaj vitokultivisto en Edenkoben, estis 2003 – 2011 unua prezidanto, antaŭe 1998 – 2003 kaj de 2011 dua prezidanto. En la fono li subtenis mecenate kaj ankaŭ disponigis la mesvinon por Diservoj.

Vaste aprezataj estis liaj prelegoj pri vinoj, la

vingustumaj vesperoj kaj la specialaj gvidadoj en Esperanto tra vitejoj. Krome li produktis la en Esperantujo faman „Esperanto-vinon“.

Kiam li fariĝis prezidanto, li en la sama jaro organizis nian ĉeeston ĉe la diocezaj katolikaj foiroj. Por la informstando li aparte aĉetis tendon, kaj pli poste, kiam la ŝtormo ĝin detruis, tuj novan por la venontaj jaroj.

Rita Rössler-Buckel



Als letzte Vorsitzende der Arbeitsgemeinschaft in der gegenwärtigen Form ist Rita Rössler-Buckel seit 2011 im Amt. Neben dieser Funktion ist sie von Beginn an zusammen mit ihrem Mann bei der Gestaltung der Gottesdienste in Speyer aktiv, meist musikalisch als Flötistin bei Vor-, Zwischen- und

Nachspielen zu Gottesdienst und Liedern, aber auch als Lektorin. Als Leiterin verschiedener Instrumentalensembles hat sie mit diesen mehrere Gottesdienste und Veranstaltungen bereichert.

Sie ist Mitübersetzerin einer Biographie über Edith Stein, welcher der Dom in deren Speyerer Zeit die Pfarrkirche war.

Rita Rössler-Buckel musiziert national wie international in Esperanto-Gottesdiensten und -Kongressen. Sie und ihr Mann sind auch bildnerisch tätig. Sie stellten u. a. 1993 im Ludwigshafener Heinrich-Pesch-Haus und 1999 im Speyerer Altpörtel aus.

Ekde 2011 Rita Rössler-Buckel estas la prezidantino de la laborunuiĝo, la lasta en la nuna formo. Krom tiu ĉi funkcio ŝi jam de komence, kune kun sia edzo, aktivis en la Diservoj en Speyer, plej ofte muzike kiel flutistino per pre-, inter- kaj postludoj kaj akompanante la kantadon, sed ankaŭ kiel lektorino. Kiel estrino de diversaj muzikaj ensembloj ŝi pliriĉigis kun ili plurajn Diservojn kaj aliajn kunvenojn.

Ŝi kuntradukis biografion pri Edith Stein, kies paroĥa preĝejo estis la katedralo, dum ŝi loĝis en Speyer.

Rita Rössler-Buckel muzikas nacie kaj internacie en esperantaj Diservoj kaj kongresoj. Ŝi, same kiel ŝia edzo, ankaŭ pentras. Ili ekspoziciis i. a. 1993 en Ludwigshafen, Heinrich-Pesch-Haus, dum la kongreso, kaj 1999 en la portalturo „Altpörtel“ en Speyer, kien ni iris post la meso.

Franz-Georg Rössler



Als Lehrer am Nikolaus-von-Weis-Gymnasium in Speyer, Schule des Instituts St. Dominikus, hat sich Franz-Georg Rössler in Kursen, Arbeitsgemeinschaften und Publikationen für Esperanto und seine Verwendung in Kirche und Kultur engagiert.

Seit Beginn gestaltete er zusammen mit seiner Frau Rita musikalisch die Esperanto-Gottesdienste in Speyer und im weiteren Rahmen der Arbeitsgemeinschaft mit, meist als Organist.

Er hält Vorträge in und zu Esperanto im In- und Ausland, malt, komponiert, konzertiert und publiziert zu verschiedenen Themen.

Kiel gimnazia instruisto li sin engaĝis por Esperanto kaj ties apliko en la eklezio kaj en la kulturo, gvidante kursojn kaj laborgrupojn kaj eldonante librojn.

Kune kun sia edzino li dekomence kontribuis muzike al la Diservoj de la laborunuiĝo en Speyer kaj en pli vastaj kadroj, plej ofte kiel orgenisto.

Li prelegas en Esperanto kaj pri Esperanto. Li pentras, komponas, koncertas kaj publikigas pri diversaj temoj.



Franz-Georg Rössler ĉiĉeronas 2013 por membroj de Bavelo kaj France-Est. (el: „Die Rheinpfalz“)

Wolfgang Bohr



Wolfgang Bohr, Vorsitzender von Esperanto RLP, schloss in unserem Namen die Verträge mit den katholischen Bildungshäusern Maria Rosenberg und Haus Venusberg für PSI, sowie mit der Marienburg für MES.

Nia membro Wolfgang Bohr kontraktis en nia nomo kun la katolikaj klerigaj domoj Maria Rosenberg kaj Haus Venusberg pri PSI, kaj kun Marienburg pri MES.

Bernhard Eichkorn

Seine Esperanto-Arbeitsgemeinschaft in der Erzdiözese Freiburg war Impuls und Modell für uns. Sein übriges Wirken ► ADORU, Bibel, Kroniko. Er schuf auch das Christliche Glossar (de-eo).

► <http://bernhardeichkorn.de/kristana-fak-vortaro/>

Lia Esperanto-Laborunuiĝo en la arĥidiocezo Freiburg estis instigo kaj modelo por ni. Pri lia alia agado vidu sub ADORU, Biblio, Kroniko.

Li verkis ankaŭ la Kristanan Glosaron (de-eo).



Heinz Trommeschläger



Erst als pensionierter Pfarrer hatte er die internationale Sprache erlernt, und schon bald darauf konnte er auf der Marienburg die Messe in Esperanto feiern und frei predigen. Er starb 73-jährig am 24. Oktober 2007.

Li estis eklerninta la internacian lingvon nur kiel pensiiĝinta paroĥestro, kaj baldaŭ poste li jam povis celebri la meson sur Marienburg en Esperanto kaj libere parolante prediki.

Li mortis 73-jaraĝa la 24an de oktobro 2007.

Kroniko

Ni listigas la okazintaĵojn, kiujn ni mem aranĝis, kaj krome kelkajn aliajn, kiuj okazis pli-malpli en nia ĉirkaŭaĵo, kaj en kiuj ni aktive partoprenis. Ne aperas ĉi tie la Bibliaj Tagoj nek la Diservoj ĉe aliaj kunvenoj kaj kongresoj.

1991 • 22.09. Speyer: Pastro Albrecht Kronenberger celebras la unuan esperantan meson en la katedralo (Afra-Kapelo).

12.10. Friedrichshafen: Okaze de la fervoja kaj bavela kongreso en la membrokunveno de la Esperanto-Laborunuiĝo Freiburg sin enskribas la unuaj 15 membroj por la Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer.

1992 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 26a de januaro, 29a de marto, 31a de majo, 27a de septembro, 29a de novembro.

26.01. Unua membrokunveno. Nombro de la fondo-membroj: 39, el ili ĉeestas 23. Elekto de la estraro: Helmut Rössler, Manfred Ritthaler, Albrecht Kronenberger.

06.02. Diocezo Speyer: Episkopa konfirmo de nia statuto kaj de Albrecht Kronenberger kiel spirita prezidanto.

20.02. Impost-oficejo Neustadt: Atesto pri nia komun-utileco.

20.06. Karlsruhe-Daxlanden: Kuncelebrita esperanta Diservo okaze de la germana katolika foiro. Prediko: Adolf Burkhardt anstataŭ ĉefepiskopo Miloslav Vlk. Kvarvoĉa Esperanto-Meso de Fridolin Limbacher, prezentata de koruso kaj blovensemblo el St. Maria München-Thalkirchen (la paroĥo de pastro Josef Grabmaier).

03.10. Mainz: Esperanta meso okaze de la fondiĝo de la GEA-landoligo Rejnland-Palatinato.

1993 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 28a de februaro, 25a de aprilo, 27a de junio, 29a de aŭgusto, 31a de oktobro.

22.-24.10. Ludwigshafen, Heinrich-Pesch-Haus: Esperanta kongreso kune kun Bavelo, GEA-RLP kaj SEL.

1994 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 27a de februaro, 24a de aprilo, 26a de junio, 28a de aŭgusto, 30a de oktobro.

27.02. Dua membrokunveno. Nombro de la membroj: 79.

1995 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 26a de februaro, 30a de aprilo (Bernhard Eichkorn), 25a de junio (kadre de la 63a kunveno de ROMOLO / Rhein-Main Ligo Esperantista), 27a de aŭgusto, 29a de oktobro.

14.-21.04 Maria Rosenberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgio de la Paska Nokto kaj meso je la Paska Lundo.

1996 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 25a de februaro (kun transdono de la nova esperantlingva meslibro al kapitulano Hubert Sedlmair kiel nia donaco por la katedralo), 28a de aprilo (Bernhard Eichkorn), 30a de junio, 29a de septembro, 24a de novembro.

25.02. Tria membrokunveno. Nombro de la membroj: 154. Reelekto de la estraro: Helmut Rössler, Manfred Ritthaler, Albrecht Kronenberger.

1997 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 23a de februaro, 27a de aprilo, 29a de junio, 28a de septembro, 30a de novembro (esceptaokaze en la kriptoj).

1998 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 15a de februaro, 26a de aprilo, 28a de junio (Bernhard Eichkorn), 27a de septembro, 22a de novembro (kun la fluto-grupo de Rita Rössler-Buckel).

15.02. Kvara membrokunveno. Nombro de la membroj: 203. Kompletigaj elektoj: 1a prezidanto: Manfred Ritthaler, 2a prezidanto: Anton Kiefer.

06.-13.04. Bonn, Haus Venusberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgioj de la Sankta Ĵaŭdo, Sankta Vendredo kaj Paska Nokto.

13.06. Mainz: Esperanta meso (ĉefepiskopo György Jakubinyi) okaze de la germana katolika foiro.

1999 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 28a de februaro, 25a de aprilo, 27a de junio (poste vizito de la arta ekspozicio de Franz Georg kaj Rita Rössler en Altpörtel), 26a de septembro (kun la Ĉaskorn-Ensemblo de la Kolpingfamilio Dudenhofen), 21a de novembro.

31.07. - 07.08. Berlin: Ekumena spirita centro dum UK. Ekumena Diservo en la Maria-preĝejo apud Alexanderplatz, prediko: Adolf Burkhardt, Esperanto-Meso de Fridolin Limbacher (kp. 1992).

2000 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 30a de januaro, 26a de marto, 28a de majo, 27a de aŭgusto, 29a de oktobro.

26.03. Kvina membrokunveno. Nombro de la membroj: 267.

2001 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 25a de februaro (P. Peter Knauer SJ), 29a de aprilo (Manfred Odenwald), 24a de junio (la unuan fojon kun ADORU), 26a de aŭgusto, 28a de oktobro (jubileo: 10 jarojn esperantaj mesoj en Speyer).

01.-04.06. Ludwigshafen, Heinrich-Pesch-Haus, kune kun GEA: Germana Esperanto-Kongreso kun ekumena Diservo kaj meso (Antonius Schmitt kaj Albrecht Kronenberger).

23.06. Stuttgart, Katarina-Preĝejo: Diservo kun inaŭguro de la Ekumena Diserva Libro ADORU, eldonita de IKUE kaj KELI.

2002 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 24a de februaro, 28a de aprilo, 23a de junio, 25a de aŭgusto, 27a de oktobro.

07.-12.02. Strasburgo: ADORU-Seminario de la aŭtoroj.

29.03.-05.04. Maria Rosenberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgio de la Paska Nokto.

13.10. Aalen: Adolf Burkhardt, Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger ricevas la FAME-Premion pro ADORU.

Kristnaska agado: Al ĉiuj pastroj kaj diakonoj de la diocezo ni donacas la libron de d-ro Ulrich Matthias „Esperanto-Das neue Latein der Kirche“ kune kun eta lernolibro de Josef Schiffer.

2003 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 23a de februaro, 6a de aprilo, 29a de junio, 24a de aŭgusto, 26a de oktobro.

23.02. Sesa membrokunveno. Nombro de la membroj: 265. Elekto de la estraro: Anton Kiefer, Manfred Ritthaler, Albrecht Kronenberger.

27.02.-02.03. Strasburgo: ADORU-Seminario.

14.-21.04. Bonn, Haus Venusberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgio de la Paska Nokto.

06.07. Johanniskreuz: Unua informstando dum la dioceza katolika foiro.

2004 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 29a de februaro, 25a de aprilo (klostro de S-ta Magdalena), 27a de junio (esperantlingva rekviemo por Adolf Burkhardt kun la ĥoral-ensemblo el Neustadt), 29a de aŭgusto, 24a de oktobro.

25.-29.02. Strasburgo: ADORU-Seminario.

04.07. Johanniskreuz: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

2005 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 27a de februaro, 24a de aprilo, 26a de junio, 25a de septembro, 20a de novembro.

27.02. Sepa membrokunveno. Nombro de la membroj: 294.

03.07. Johanniskreuz: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

16.-18.09. Marienburg apud Zell / Mosel: 1a MES / Mozellanda Esperanto-Semajnfino. Meso: Heinz Trommeschläger kaj Albrecht Kronenberger.

2006 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 26a de februaro, 30a de aprilo, 25a de junio, 27a de aŭgusto, 26a de novembro.

02.07. Johanniskreuz: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

15.-17.09. Marienburg apud Zell / Mosel: 2a MES / Mozellanda Esperanto-Semajnfino. Meso: Albrecht Kronenberger.

Aperas ĉe KAVA-PECH nova eldono de la BIBLIO, editorita de IKUE kaj KELI. La preparlaborojn faris membroj de nia Laborunuiĝo.

2007 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 25a de februaro, 29a de aprilo, 24a de junio, 30a de septembro, 25a de novembro.

02.-09.04. Bonn, Haus Venusberg: PSI / Printempa Semajno Internacia.

29.04. Oka membrokunveno. Nombro de la membroj: 311. Reelekto de la estraro: Anton Kiefer, Manfred Ritthaler, Albrecht Kronenberger.

01.07. Johanniskreuz: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

28.-30.09. Marienburg apud Zell / Mosel: 3a MES / Mozellanda Esperanto-Semajnfino. Meso: Heinz Trommeschläger.

2008 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 24a de februaro, 27a de aprilo (Bernhard Eichkorn), 8a de junio, 31a de aŭgusto, 9a de novembro.

21.-28.03. Maria Rosenberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgio de la Paska Nokto.

15.06. Speyer: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

26.-28.09. Marienburg apud Zell / Mosel: 4a MES / Mozellanda Esperanto-Semajnfino. Meso: Albrecht Kronenberger.

2009 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 1a de marto, 17a de majo, 28a de junio, 30a de aŭgusto, 8a de novembro (Anton Böckel, germane).

05.07. Homburg: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

25.-27.09. Marienburg apud Zell / Mosel: 5a MES / Mozellanda Esperanto-Semajnfino. Meso: Albrecht Kronenberger.

2010 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo (kelkafoje asistis Otto Lehner): 28a de marto, 29a de aŭgusto, 24a de oktobro.

22.05. Kaiserslautern, Edith-Stein-Haus: Pentekosta Diservo (Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger) kun la paroĥanoj okaze de la germana kaj franca esperanta kongreso. Pentekostan dimanĉon: Matena Laŭdo.

27.06. Kusel: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

28.11. Je la unua dimanĉo de Advento Bernhard Eichkorn, Albert Urban kaj Albrecht Kronenberger inaŭguras la interretan portalon KRISTANAJ FONTOJ (fontoj.net) post iom pli ol kvar monatoj de preparo. Ĝi enhavas ankaŭ paĝaron „Esperanto-AG Speyer“.

2011 • Speyer: Esperantaj mesoj en la katedralo: 27a de marto, 29a de majo, 31a de julio, 23a de oktobro.

27.03. Naŭa membrokunveno. Nombro de la membroj fine de 2010: 353. Elekto de la estraro: Rita Rössler-Buckel, Anton Kiefer, Albrecht Kronenberger.

22.-29.04. Maria Rosenberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgio de la Paska Nokto.

19.06. Speyer: Informstando dum la dioceza katolika foiro.

23.10. Speyer, Friedrich-Spee-Haus: Tri jubileoj: 20 jarojn esperantaj mesoj en la katedralo de Speyer, 20 jarojn Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer, 10 jarojn ADORU.

2012 • 02.-09.04. Bonn, Haus Venusberg: PSI / Printempa Semajno Internacia, kun la liturgioj de la sankta ĵaŭdo, sankta vendredo kaj Paska Nokto.

2013 • 29.06. Maria Rosenberg: Meso okaze de la Rejnland-Palatinata Esperanto-Tago.

19.10. Speyer: Programo por Bavelo kaj France-Est: Vizito de la urbo kaj katedralo (ĉiĉerono: Franz-Georg Rössler). Diservo.

2014 • 04.-08.08. Kloster Kirchberg: Renkontiĝo memore al Adolf Burkhardt († 2004) kaj la laboro de la aŭtoro teamo de ADORU. Komuna kantado. Polurado de novaj kantotekstoj.


2015 • 01.-08.08. Strasburgo: Ekumena Kongreso de IKUE kaj KELI. Mesoj: P. Benoît Ente OP. Protestanta Diservo kun Sankta Manĝo: Gerrit Berveling kaj Philippe Cousson. Orgenkonzerto: Stefan Lepping. Kantorondoj: Albrecht Kronenberger.

2016 • 16.-23.07. Nitra (Slovakujo): Rezentado de la laborunuiĝo fare de la prezidantino en la 69a IKUE-kongreso. Muziko, ekspozicio, prelego pri nia agado.

21.-23.10. Homburg (kadre de la Kultura Semajnfino de SEL): Festado de la jubileo „25 jarojn Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer“. Diservo. Prezento de tiu ĉi Festbroŝuro.

Deka kaj lasta membrokunveno (fina nombro de la membroj: 372 vivantaj de entute 434 el 27 landoj). Malfondo de la Laborunuiĝo.

Membrostatistiko 1991 – 2016:



el: Argentino (1), Aŭstralio (1), Aŭstrujo (5), Belgujo (9), Brazilo (1), Britujo (2), Bulgarujo (2), Ĉeĥujo (11), Danujo (2), Estonujo (2), Finnlando (1), Francujo (40), Germanujo (277), Hungarujo (9), Italujo (15), Kroatujo (1), Litovujo (4), Nederlando (18), Nepalo (1), Pollando (13), Rumanujo (11), Slovakujo (1), Svedujo (1), Svislando (3), Tajvano (1), Usono (1), Uzbekujo (1).

Niaj mortintoj

Pastro Jakob Bergweiler, Bernkastel-Kues, DE, * 1904, † 1995
Vasile Albu, Sibiu, RO, * 1927, † 1995
Reinhold Klotz, Germersheim, DE, † 1996
Pastoro Werner Druschler, Nürnberg, DE, * 1922, † 1997
Pastro Karl Cunz, Mutterstadt, DE, * 1926, † 1997
Ursula Rinnert, Kaiserslautern, DE, † 1998
Kamilla Donabauer, Aalen-Wasseralfingen, DE, * 1900, † 1998
Peter Klein, Mutterstadt, DE, † 2000
Pastro Karlo Musazzi, Roma, IT, * 1922, † 2001
Ursula Richter, Hofheim, DE, * 1919, † 2001
D-ro József Kondor, Neuwied, DE, * 1921, † 2002
David Featherstone, South Croydon, GB, * 1923, † 2002
Ella Klünder, Steinfurt, DE, * 1954, † 2002
Hella Lanka, Hamburg, DE, * 1925, † 2003
Pastro Antonius Schmitt, Michelstadt, DE, † 2003
Rudolf Skoruppa, Bad Wörishofen, DE, * 1930, † 2003
Pastoro Adolf Burkhardt, Weilheim an der Teck, DE, * 1929, † 2004
Julie Winter, Wolfhagen, DE, * 1906, † 2004
Irmgard Rössler, Sankt Martin, DE, * 1932, † 2005
Fratino Theotima Rotthaus, Freiburg-Günterstal, DE, * 1937, † 2005
Egon Kiefer, Lohr am Main, DE, * 1930, † 2005
Rudolf Büsche, Mainz, DE, * 1931, † 2006
Anny Hartwig, Nürnberg, DE, * 1937, † 2006
Fratino Robertina, Waldfishbach-Burgalben, DE, † 2007
Erika Schneider, Gechingen, DE, † 2007
Pastro Heinz Trommeschläger, Langsur, DE, * 1934, † 2007
Els Kervers van Tholen, Wylre, NL, * 1915, † 2007
Vèra Kavkova, Praha, CZ, † 2008
Claude Piron, Coppet, CH, * 1931, † 2008
Günther Becker, Blieskastel, DE, * 1930, † 2008
Elisabeth Buckel, Dudenhofen, DE, * 1921, † 2009
Henny De Ketelaere, Antwerpen, BE, * 1928, † 2009
Gerhard Hirschmann, Magdeburg, DE, * 1939, † 2009
Alois Haupenthal, Sulzbach, DE, * 1918, † 2009

Karl-Ernst Salzman, Ludwigshafen, DE, * c. 1934, † 2010
 Jacobus K. Hammer, Zaandam, NL, * 1928, † 2011
 Jacques Tuinder, Heemskerk, NL, * 1933, † 2011
 Eugeny Perevertajlo, Taschkent, UZ, * 1938, † 2012
 Helmut Rössler, Speyer, DE, * 1925, † 2012
 Manfred Magin, Mutterstadt, DE, * 1953, † 2012
 Margot Hauptenthal, Sulzbach, DE, * 1922, † 2012
 Diakono János Kirsch, Szekszárd, HU, * 1961, † 2012
 Pastro Josef Grabmaier, Rosenheim, DE, * 1925, † 2012
 Margret Brandenburg, Telgte-Westbevern, DE, * 1932, † 2012
 François Simonnet, Sens, FR, * 1940, † 2012
 Manfred Ritthaler, Neustadt an der Weinstraße, DE, * 1933, † 2012
 Albert Bessière, Rouen, FR, † 2013
 Profesoro Helmar Frank, Paderborn, DE, * 1933, † 2013
 Maximilian Purschke, Rüsselsheim, DE, * 1925, † 2013
 Åke Ahlrén, Kista (Stockholm), SV, * 1918, † 2014
 Edgar Becker, Wilgartswiesen, DE, * 1947, † 2014
 Manfred Karch, Ludwigshafen, DE, † 2014
 Marianne Frank, Duisburg, DE, † 2015
 Hélène Vincent, Nantes, FR, † 2015
 Astrid Hanke, Westerland / Sylt, DE, * 1930, † 2015



Hansjörg Kindler (Trixini), Rieden am
 Forggensee, DE, * 1933, † 2015
 Ursula Hengen, Neustadt/Weinstr., DE,
 * 1932, † 2016
 Armando Zecchin, Torino, IT,
 * 1924, † 2016
 Ida Rössler, Speyer, DE,
 * 1928, † 2016
 Reinhold Ritthaler, Kaiserslautern, DE,
 * 1934, † 2016

*Mi ne mortos, sed mi vivos,
 kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo.*

Psa 118,17 • Tomboŝtono de Adolf Burkhardt

2011: Drei Jubiläen und ein Ende

Vor 5 Jahren konnten wir mit einer Messe in der Afra-Kapelle und einer kleinen Feier im Friedrich-Spee-Haus drei Jubiläen begehen:

- 20 Jahre Esperanto-Messen im Dom
- 20 Jahre Esperanto-AG
- 10 Jahre ADORU

Die Vorsitzende erklärte in ihrer Festrede, warum die regelmäßigen Esperanto-Gottesdienste im Dom nun auf-

hören: „Wir alle spüren die vergangenen Jahre, und wenn es nicht im Kopf ist, dann immerhin in unseren Knochen, die nicht jedem mehr erlauben, in die Afra-Kapelle hinabzusteigen. Auch hat sich unsere aktive Gruppe leider nicht vervielfacht.“

Aber sie weiß auch: „Unsere Form des praktizierten Christentums, unsere Art, Esperanto zu leben, hat ihren Wert nicht verloren. Unsere Lebensform, unsere ‚Ideale‘ waren nicht sinn- und nutzlos. Unsere Arbeit war nicht vergeblich.“ – „Danken wir für die gemeinsam verbrachten Jahre und für den Segen Gottes über uns in diesem Zeitraum.“



2011: Tri jubileoj kaj unu fino

Antaŭ 5 jaroj ni povis per meso en la Afra-Kapelo kaj per eta solenaĵo en Friedrich-Spee-Domo festi tri jubileojn:

- 20 jarojn esperantaj mesoj en la katedralo
- 20 jarojn Esperanto-Laborunuiĝo
- 10 jarojn ADORU

En sia festparolado la prezidantino klarigis, kial la regulaj esperantaj mesoj en la katedralo nun ĉesas: „Ni ĉiuj sentas la pasintajn jarojn, ne nepre en la cerboj, sed certe en la ostoj, kiuj ne plu al ĉiu permesas malsuprengrimpi en la Afra-Kapelon. Kaj nia aktiva grupo ne multobliĝis, bedaŭrinde.“

Sed ŝi ankaŭ scias: „Ni sobre konstatu, ke nia formo de kristaneco, de esperantisteco ne perdis sian valoron. Ni scias, ke nia laboro ne estis vana, niaj streboj ne vantaj aŭ senvaloraj.“ – „Ni danku por la kune pasigitaj jaroj kaj por la beno de Dio dum tiu ĉi tempospaco.“

25 Jahre Esperanto-Arbeitsgemeinschaft in der Diözese Speyer

25 jarojn Esperanto-Laborunuiĝo en la diocezo Speyer

1991 – 2016



2011: Post la lasta Esperanto-Diservo en la Afra-Kapelo de la katedralo de Speyer

„Die Esperanto-Arbeitsgemeinschaft als Organisation geht nun zu Ende.
Nicht zu Ende gehen die Gemeinschaft, die Arbeit und die Hoffnung.“

„La Esperanto-Laborunuiĝo kiel organizaĵo nun ĉesas,
sed ne ĉesos la unueco, nek la laboro, nek la espero.“